# TEA-BULTENO

2ª JARO | OKTOBRO 1999 | NUMERO 10

## AGENDO

| | | |
|---|---|---|
| 1 | V | E-Filatelo: dokumentoj pri nia historio *(Piton)* |
| 2 | S | |
| 3 | **D** | |
| **4** | L | |
| 5 | M | James Rezende Piton kun ni! |
| 6 | M | |
| 7 | Ĵ | 11ª Alp-Adria Esperanto-Konferenco en Pula |
| 8 | V | |
| 9 | S | |
| 10 | **D** | |
| **11** | L | |
| 12 | M | Ordigo de nia arkivo |
| 13 | M | |
| 14 | Ĵ | |
| 15 | V | Tra Vjetnamio (1ª parto) |
| 16 | S | |
| 17 | **D** | |
| **18** | L | |
| 19 | M | Ordigo de nia arkivo |
| 20 | M | |
| 21 | Ĵ | |
| 22 | V | Vjetnamio (2ª parto) |
| 23 | S | |
| 24 | **D** | |
| **25** | L | |
| 26 | M | Ordigo de nia arkivo |
| 27 | M | |
| 28 | Ĵ | |
| 29 | V | Ludkarta vespero |
| 30 | S | |
| 31 | D | |

Se vi rigardas atente la Agendon, ĉi-foje (almenaŭ miaopinie) la programo estas riĉenhava, partopreninda, ĉeestinda: fama gasto el Brazilio estos dufoje kun ni (kaj tio vere ne estas ĉiutaga okazaĵo!), Alp-Adria konferencanoj kunvenos en Pula (estas ankoraŭ tempo por aliĝi!), finfine la prezentado de diapozitivoj pri Vjetnamio estas preta, ree komenciĝos la paroliga kurso (ĉiun vendredon je la 18ª horo), kaj denove oni eklaboras por definitiva ordigo de la historia arkivo kaj de la biblioteko (laboremaj aninoj eĉ dumsomere ŝvitis super tio!). Do, ni tutkore invitas vin ĉeesti la programojn, kiuj **certe** okazos, se ankaŭ **VI** ĉeestos!

Kaj nun, por enkonduki vin en la Vjetnamian etoson, jen raporto pri la Azia Kongreso de Edvige Ackermann:

**Ha noi/Viet Nam, 22-25.8.99** - Kelkaj ciferoj: 420 partoprenintoj, 16 landoj reprezentitaj, inkluzive de Italio. Temperaturo: ekster la kongresejo, kutime 37° C kun 90% da malsekeco; en la kongresejo, dank' al klimatiziloj, sufiĉe agrabla. Etoso: grandioza!!! Temo: «Kunlaboro por paco, stabileco kaj disvolviĝo».

Entute, sukcesa kongreso, kiu vekis grandan atenton ĉe amaskomunikiloj kaj ricevis grandan subtenon fare de la Registaro.

Inaŭguris la aranĝon la Vicprezidantino de Socialisma Respubliko de Vjetnamio kiu substrekis la valoron de la internacia lingvo Esperanto, precipe rilate la celojn indikitajn en la kongresa temo, dum, en alia tago, oficiale akceptis, en la Registara Palaco, reprezentantojn de UEA, KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado) kaj de aliaj landoj la Vic-ĉefministro kaj Ministro pri eksteraj rilatoj. Ĉi-lasta, dum salutparolado, rememoris la multajn kontribuojn de esperantistoj kaj de Esperanto-organizaĵoj al la batalo de Vjetnamio por paco kaj sendependeco kaj substrekis la internacian valoron de nia lingvo, atentigante ke ĝi estis unu el la kvin lingvoj (la aliaj: angla, ĉina, franca, vjetnama) uzitaj de Radio VOĈO EL VJETNAMIO en la jaro 1945 por dissaŭdigi la Deklaron pri Sendependeco faritan de Ho Chi Min.

Vjetnamiaj esperantistoj estas ĉarmaj, simpatiaj, sindonemaj, ktp ktp. Estis granda ĝojo troviĝi inter ili kaj tute libere interŝanĝi opiniojn, dezirojn, sugestojn. Mi ne povas detale paroli pri ĉiuj afablaĵoj kaj donacoj ricevitaj, sed kredu ke ni (mi kaj Elda) estis vere kortuŝitaj kaj la adiaŭo al la junulinoj de Hanoi estis tutsimple emociiga.

Nenia problemo por viziti la landon, krom la aŭgusta varmega klimato kaj la konstanta sieĝo fare de vendistoj ĉiaspecaj, sed oni devas esti paciencaj ĉirilate: Vjetnamio estas tre malriĉa lando, la vivkondiĉoj kelkfoje estas tre mizeraj, kaj la loĝantaro klopodas per ĉiuj eblaj rimedoj plibonigi sian vivon.

Rekomendindas vizito al tiu fora lando: se iu interesiĝas pri tio, mi estas je dispono.

## FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA
## RISULTATI DELLE ELEZIONI

Durante il 68° Congresso Italiano, lunedì 23 agosto si è riunito al Palacongressi di Riva del Garda, il nuovo Consiglio Nazionale della FEI. Erano presenti 14 consiglieri su 21. È stato eletto:

**Presidente** Giordano FORMIZZI
**Vice-presidente** Renato CORSETTI.

Il presidente ha nominato due componenti del Comitato Esecutivo nelle persone di Pierluigi CINQUANTINI e Fabrizio PAGLIAROLI. Il consiglio ha poi eletto i rimanenti tre componenti nelle persone di Gianfranco POLERANI, Gustavo BONVECCHIATO e Laura BRAZZABENI. A Bonvecchiato è stato confermato l'incarico di segretario generale e a G. Polerani quello di segretario amministrativo. Gli altri incarichi verranno attribuiti nella prossima riunione. Umberto Broccatelli, come aveva già dichiarato durante l'assemblea, non ha voluto far parte dell'Esecutivo, ma continuerà a svolgere l'incarico di Redattore della rivista e di rappresentante della FEI in seno al comitato dell'EEU.

Il C.E. si riunirà a Roma il 3 ottobre e il C.N. si riunirà a Milano il 21 novembre.

## Lo scemo del villaggio



Venerdì 10 settembre. Sul tg2 di ieri sera, in anteprima, ho visto un servizio che parlava di come il governo italiano stia per lanciare nel prossimo futuro una campagna di pubblicità progresso - sia in televisione che con manifesti - che suona così: **«Computer e inglese chi si aggiorna cresce»**, come sottotitolo ci sarà **«chi sarà lo scemo del villaggio globale?»**

Lo spot televisivo lo vedrete da voi. È nata la categoria degli analfabeti del 2000. Inoltre si sono impegnati a investire 200.000 miliardi di lire a partire dal 2000-2001 per l'alfabetizzazione informatica in Italia. Faccio notare che non è scritto "computer e lingue" ma proprio inglese, la lingua del futuro e delle mille opportunità. Ora, giunti a questo punto, se il governo prende una posizione così netta, non oso pensare quale sarà la politica linguistica italiana nel futuro, visto che non c'è la volontà di "costruire" qualcosa di diverso ma quella di "seguire" la tendenza globalizzatrice e americanizzatrice del momento. La cosa più grave è che non esiste una parallela campagna per la tutela dell'italiano. Non voglio nemmeno pensare alla nostra futura propaganda. Già mi vedo quelli che non capiscono le nostre ragioni (i più), quando dirai "esperanto" ti risponderanno: «ma chi sei, lo scemo del villaggio globale? Aggiornati e cresci!». Non parliamo poi della democrazia linguistica e di tutela delle minoranze, la gente è felice così: largo a Bill Gates e ai corsi di inglese, per il resto non c'è tempo, con buona pace dell'articolo 2 del trattato CEE (titolo 8 - capo 3) che dice che «la comunità si impegna a favorire lo studio dellE linguE dell'Unione". Adesso cosa vogliamo fare? scrivere qualche letterina di protesta prendendo a pugni un muro di gomma? Tirare dritti per la nostra attuale strada? E non consoliamoci dietro tiepidi ottimismi e «ma sì, dai, in fondo non è poi questa tragedia, ci sono ancora tanti spazi» facendo gli indiani. Non serve. E non lo dico come esperantista, ma come cittadino italiano.

*Michele GAZZOLA*

**Questa lettera è stata scritta per**
NOVA SENTO - SPAZIO GIOVANE PER I GIOVANI (MA NON SOLO) (N° 87)
Redazione: nova-sento@esperanto.it
Responsabile: Francesco Amerio <f.amerio@libero.it>
**alla quale si sono aggiunti altri messaggi di protesta, commento e critica.**

**Ma voi, cosa ne pensate?**

## Pri la fino de la jarmilo

Jam de pluraj monatoj, sur la ĵurnaloj legeblas ofte diskutoj kaj disputoj pri la dato de la fino de la dua jarmilo: kelkaj subtenas, ke la dua jarmilo finiĝos la $31^{an}$ de decembro 1999, aliaj, male, ke tiu fino okazos la $31^{an}$ de decembro 2000.

Unue, direndas ke la cifero «0» (nulo) estis enkondukita de la araba numera sistemo je la X (deka) jarcento p.K.: ĝis tiam oni uzis la latinan sistemon skribendan per alfabetaj literoj (I-II-D-L- ktp).

Due, direndas, ke la jaroj estas kalkulataj «POST Kristum Natum», kiel oni diras latine, nome POST kiam Kristo naskiĝis, do ne estas kalkulata la jaro de Lia naskiĝo.

Trie, direndas, ke en la unua klaso de la elementa lernejo, kaj eĉ antaŭe, oni instruas al la infanoj nombri la fingrojn de la manoj; tial mi demandas: kiom da fingroj havas entute la du manoj? Ĉiu homo estas libera festi la finon de la jarmilo en kiu ajn jaro tiu homo deziras, sed ĉar la matematiko ne estas opinio, la fino de la jarmilo estos la 31-12-2000, je la $24^{a}$ horo.

*Pier Giorgio SORANZO*


## Esperanta Turisma Societo Ljubljana

Sideja adreso: Tavĉarjeva 2
Poŝta adreso: pk 1621
SI-1001 Ljubljana

**Oktobra programo** - ĉiuĵaŭde je la 19.30 h.

| | |
|---|---|
| **07.10** | Preparo por Alp-Adria renkontiĝo en Pula |
| **14.10** | Raporto pri la $11^{a}$ Alp-Adria Konferenco |
| **21.10** | Lingva vespero kaj Esperanto-novaĵoj |
| **28.10** | Nederlando en diapozitivoj |



BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

# OKTOBRO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | | 4 | 11 | 18 | 25 |
| Mardo | | 5 | 12 | 19 | 26 |
| Merkredo | | 6 | 13 | 20 | 27 |
| Ĵaŭdo | | 7 | 14 | 21 | 28 |
| Vendredo | 1 SUKKOT | 8 | 15 | 22 | 29 |
| Sabato | 2 | 9 | 16 | 23 | 30 |
| Dimanĉo | 3 | 10 | 17 | 24 | 31 |


# OKTOBRO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | | 4 | 11 | 18 | 25 |
| Mardo | | 5 | 12 | 19 | 26 |
| Merkredo | | 6 | 13 | 20 | 27 |
| Ĵaŭdo | | 7 | 14 | 21 | 28 |
| Vendredo | 1 SUKKOT | 8 | 15 | 22 | 29 |
| Sabato | 2 | 9 | 16 | 23 | 30 |
| Dimanĉo | 3 | 10 | 17 | 24 | 31 |

**5760 HEBREA JARO**

**1 - SUKKOT**. En tiu ĉi tago finiĝas semajno riĉa je gravaj religiaj signifoj. Ĝi komenciĝis la $24^{an}$ de septembro.

SUKKOT, «Festo de Tabernakloj», origine estis unu el la tri festoj dediĉitaj al Dio por Lin danki pro la abunda rikoltado kaj favorakire de fekunda kamparo. Al tio aldoniĝas la rememoro de la liberigo el la sklaveca stato de hebreoj en Egiptio kaj ilia Eliro survoje al la Promesita Lando.

Per ĉi tiu festado la hebrea popolo memorigas kiel Dio protektis kaj subtenis sian popolon dum la trairo de la dezerto kaj de la Ruĝa maro. La Levida libro postulas, ke oni konstruu kaj enloĝu dum sep tagoj la tiel diritajn Tabernaklojn, specojn de templo en formo de granda tendo kun subtenanta ĉarpantaĵo. Kutime tiuj rifuĝejoj estas faritaj en la hejmaj ĝardenoj kaj kortoj aŭ apud la sinagogoj. Laŭmore en tiuj ŝirmejoj oni tag- kaj vespermanĝas kaj, se la klimato permesas, eĉ oni dormas.

**2559 BUDHISTA JARO**

**2055 HINDUISMA JARO**

**1999 KRISTANA JARO**

**1420 ISLAMA JARO**

**5760 HEBREA JARO**

**1 - SUKKOT**. En tiu ĉi tago finiĝas semajno riĉa je gravaj religiaj signifoj. Ĝi komenciĝis la $24^{an}$ de septembro.

SUKKOT, «Festo de Tabernakloj», origine estis unu el la tri festoj dediĉitaj al Dio por Lin danki pro la abunda rikoltado kaj favorakire de fekunda kamparo. Al tio aldoniĝas la rememoro de la liberigo el la sklaveca stato de hebreoj en Egiptio kaj ilia Eliro survoje al la Promesita Lando.

Per ĉi tiu festado la hebrea popolo memorigas kiel Dio protektis kaj subtenis sian popolon dum la trairo de la dezerto kaj de la Ruĝa maro. La Levida libro postulas, ke oni konstruu kaj enloĝu dum sep tagoj la tiel diritajn Tabernaklojn, specojn de templo en formo de granda tendo kun subtenanta ĉarpantaĵo. Kutime tiuj rifuĝejoj estas faritaj en la hejmaj ĝardenoj kaj kortoj aŭ apud la sinagogoj. Laŭmore en tiuj ŝirmejoj oni tag- kaj vespermanĝas kaj, se la klimato permesas, eĉ oni dormas.

**2559 BUDHISTA JARO**

**2055 HINDUISMA JARO**

**1999 KRISTANA JARO**

**1420 ISLAMA JARO**